

La programita instruado de Esperanto en Svislando, raporto de Claude Gacond
por la Internacia Konferenco pri Interlingvistiko en Paderborn (24-28.11.1976),
3-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 686, 1976.12.01 & 03 & 04

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la du pasintaj semajnoj ni komencis prezenti al vi la raporton, kiun mi faris pri la programita instruado de esperanto antaŭ la Internacia Konferenco pri Interlingvistiko okazinta de la 24-a ĝis la 28-a de novembro en Paderborn. Ĝin organizis la Esplorcentro pri Kibernetika Pedagogio. Ni unue donis al vi la liston de la programitaj kursoj, kiujn Kultura Centro Esperantista funkciigis ekde la jaro 1970 kaj diris al vi, ke instruistoj formiĝas al la programita, aŭdvida kaj per drama instruado en la kadro de pedagogiaj seminarioj semajnfinaj aŭ feriaj.

A.- La programita instruado estas bazite sur esploraj analizoj de la instruotaĵo. Nian esplorklaboron por la pretigado de programitaj kursoj de esperanto ni grandparte faris kun la helpo de Henri Vatré, kiun la literaturŝatantoj ankaŭ konas sub la nomo de Henri Baupierre. Ni rapide malkovris, ke la lernolibroj nun aĉeteblaj nur tre supraĵe priskribas nian lingvon, kaj ke la programado ne povas kontentigi, kun tiu ĉi ĝenerale akceptita priskribo.

Cl.- Ni donu unu ekzemplon. Nia kalkulo de la ofteco de la monemoj ekzemple montris, ke la pseŭdosufikso **al**, kiun oni renkontas en adjektivoj kiel **centrala, horizontala, universala** estas en multaj tekstoj same ofta kiel la sufikso **ul**. Kial instrui pri unu kaj silenti pri la ekzisto de la alia ? Multe da tempo ni devis dediĉi al similaj demandoj, serĉante ĝeneralajn regulojn kaj kontentigajn metodojn por ilin prezenti al la gelernantoj. Koncerne la pseŭdosufikson **al** ni konstatis, ke ĝi permesas formi adjektivon el substantiva monemo reduktante ties signifon. La vera adjektivo de **centro, horizonto** kaj **universo** estas **centra, horizonta** kaj **universa**. Centra placo estas placo, kiu troviĝas en la centro ; horizonta linio estas la linio de la horizonto ; universa grandeco estas la grandeco de la universo. La adjektivoj **centrala, horizontala** kaj **universala** konservas nur partan signifon de la adjektivoj **centra, horizonta** kaj **universa**. Centrala placo estas ne necese en la centro de urbo, sed ĝi ludas centran rolon ; horizontala linio ne necese estas tiu de la horizonto ; UEA ne estas universa esperanto-asocio sed universala esperanto-asocio, ĉu vi sentas la nuancon ?

A.- Pli kaj pli Kultura Centro Esperantista, ekde la jaroj 70, celas la aŭtomatan instruadon de esperanto. Iu ajn lernanto devus povi sekvi iam ajn esperanto-kurson programitan je la ekzakta nivelo, kie li troviĝas. Tial ni komencis ellabori kaj eksperimenti testojn, kiuj devus malkovrigi al ni la lingvan nivelon de ĉiu testato, liajn mankojn koncerne la fakojn vortformado, gramatiko, elparolo, ktp.

Cl.- Tiuj ĉi testrezultoj montrus al ni, kiujn lecionojn de la elementa kurso de esperanto lernanto devus ripeti aŭ ekstrastudi, ripeto kaj trastudo disvolviĝontaj individue aŭ grupe laŭ la necesoj. Tiu ĉi instruado disvolviĝus en taŭge ekipita studejo. Tio estas la celado de nia verklaboro nuntempa.

A.- La kursverkantoj alfrontas malfacilan problemon, kiun ni deziras mencii. La plimulto de la esperanto-instruistoj ne penas intime konatiĝi kun la lernolibroj, kiujn ili utiligas. Nur tre supraĵe ili uzas ilin. Tre ofte ili eĉ malkovras ilin ĉapitron post ĉapitro dum la instruado. Por favorigi pli profundan konon de la lernolibroj, kiujn oni plej ofte utiligas en la porinfana

instruado, ni pretigis aldonajn dokumentojn, kiel ekzemple la listojn de la vortaro instruata en **Esperanto por infanoj** de Gladstone Solomon, de **Tom kaj Tina** kaj **Tom kaj Tina en la flugmaŝino** de Ole Nederland.

Cl.- La instruistoj, kiuj ne akiras detalan kaj intiman superrigardon pri la lernolibro, kiun ili uzas, tendencas ĉiujare elekti novan instruilon, ĉar ili opinias, ke ili fine trovos tion, kion ili bezonas. Fakte ilia diletantismo malhelpas ilin vere ekspluati la latentajn eblojn de lernolibro. Ni forte timas, ke similaj instruistoj neniam kapablos ekuzi programitajn kursojn, ĉar la programitaj kursoj, pli ol la klasikaj, devigas la instruistojn akcepti sekvi antaŭprogramitan konduotlinion.

A.- Sed kiuj tion kapablas fari, tiuj rapide malkovras, ke la programita instruado havas siajn avantaĝojn. Ĝi permesas gajni multe da tempo por utilaj kontaktoj. Ekzemple nia Perkoresponda programita kurso de esperanto estas uzebla por la hejma laboro. Ĝi tiam liberigas la instruiston de la teda laboro instrui gramatikaĵojn profite al la pli nobla instruado de la legado, vortfarada studado, parolado. Rezulte la instruisto havas pli da kontaktoj kun la gelernantoj, ol kiam li penadas instrui rutinaĵojn gramatikajn, kiujn la gelernantoj povas mem lerni laŭ individua ritmo. Sed tio devigas la instruiston tamen bone koni la kursmaterialon por povi respondi al eblaj demandoj de la gelernantoj kaj ligi sian instruadon al la konoj, kiujn la instruatoj jam akiris. Ni sentas la bezonon verki por ĉiu kurso uzklarigojn por la instruantoj. Ju pli kompleta estas la kurso, des pli kompleksa estas la formado de la instruantoj ĝin uzontaj.

Cl.- Venontan semajnon ni priskribos la kurson **Perkoresponda programita kurso de Esperanto**.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!